# *Maduro akuzas Duque persone kontroli la militan strategion kontra? Venezuelo*



Karakaso, jun 4 (RHK) La venezuela prezidento Nicolás Maduro, asertis ke lia kolombia homologo, Iván Duque “persone” inspektas la kampadejojn kie oni preparas novajn operaciojn kontra? sia lando.

Maduro asertis ke li “havas informojn konfirmitajn ke pere de militaj estroj en Medellín en Antioquia li faras tiun kontrolon”. En la nordo de Santander rekuni?is dungosoldatoj kun pormilitistoj, kiuj preparas novajn operaciojn kontra? Venezuelo.

La venezuela prezidento asertis ke la registaro de Duque plu havas kiel opcion la maran operacion, spite al tio ke fiaskis tiu  farita la pasintan 3-an de majo, kiam la venezuelaj trupoj kaptis ilin.

Maduro konfirmis ke la  a?toritatuloj en Karakasoj denuncis la planojn preparatajn ekde Kolombio, sed “Iván Duque ?ajnigis al si freneza”. Li anka? aldonis ke ekde la Blanka Domo oni informis al la ?tatestro kolombia ke “estis la momento fortigi la preparojn kaj ataki Venezuelon.”

Pro tio, la bolivara ?tatestro petis al la militaj fortoj kaj al la popolo venezuela resti atentaj kaj “prepari la reagan kapablon” de la lando fronte al kiu ajn ekstera ago.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/224705-maduro-akuzas-duque-persone-kontroli-la-militan-strategion-kontrau-venezuelo

**Radio Habana Cuba**